



# ESPERO KATOLIKA

## LA PAROLO ESTU AL VI !

Nur kelkaj monatoj disigas nin de nia XXVa. Ĝi estu vera jubilea kongreso, impona pro sia multnombra ĉeestantaro kaj efika dank' al sia unuaranga strukturo. La L.K.K. en kunlaboro kun la Organiza Komitato intertempe fiksas la definitivan programon, riĉenhavan kaj allogan por ĉiuj vizitontoj. La detalojn Vi trovos en la aldonita cirkulero. Nepre ĝin legu kaj se Vi ankoraŭ ne decidis aliĝi, faru tion nun. Senprokraste. Ju pli da kongresanoj, des pli granda la valoro de nia XXVa! Amsterdam atendas Vin kaj havigos al Vi agrablajn tagojn en internacia rondo katolika.

A. F. Leideritz.



\*

## I.K.I. VI.

Samkiel tiom da aliaj aferoj la milito 1940-45 ĉesigis ankaŭ la laboron de I.K.I. Post la milito la unua kunveno de la IKI-komitato okazis la 2an de Okt. '45 kaj oni pripensis kiel ree komenci la laboron. Oni decidis sendi duoblajn poŝtkartojn al la antaŭaj abonantoj de Vojo-Vero-Vivo por sciigi ĉu ili ankoraŭ havas intereson koncerne IKI kaj por ke ili skribu se necese siajn ŝanĝitajn adresojn. Forsendiĝis pli ol 400 kartoj kaj iom post iom alvenis pli ol 300 respondoj, proks. 30 restis netransdoneblaj. Ĉiuj 300 petis denove alsendon de la VVV. Ankaŭ la tuta Protestantana Kanonikaro kaj 2 Pastoroj el Lund en Svedujo petis pri tio. Tiom da jaroj ili jam pristudis la VVV-numerojn; ĉu estus tro absurde supozi ke Dio ankaŭ tie volis beni la laboron de IKI, ke IKI povis aldoni tre malgrandan ŝtoneton por aliformi la konstruaĵon de antipatiego, por plibonigi la interrilatojn inter la Luteraj Svedoj kaj iliaj Katolikaj samlandanoj? Kiel ajn tio estu, kun ĝojo ni povas konstati, ke IKI ne laboras senfrukte. Sed necesega restas nia subteno, ĉar sen tiu, sen niaj mondonacoj, IKI ne povas daŭrigi sian dibenitan laboron.

E.H.

## ATENTU !

La Administracio de Espero Katolika estos fermita pro libertempo de 3-30 Junio 1954.

Redaktejo kaj Libro-Servo estos fermitaj de 3 - 22 Junio 1954.

## NOMOJ DE SANKTULOJ EN ESPERANTO IV

La ŝanĝo de i-e estas kutima ĉe esperantiĝo, kiel la sama aŭtoro (L. de Beaufront) rimarkas :

matin (franca) mateno, jardin (fr) ĝardeno, kaj aliaj: bulletin bulteno, chagrin ĉagreno. La sama lingva evoluo troviĝas en aliaj lingvoj:

Franciscus Francesco (itala) Godefridus Godefredo (hispana)

Ni eĉ trovas ekzemplojn de propraj nomoj je -eno en Esperanto!

Marteno (L. Zamenhof, Fabeloj de Andersen, III, p. 92), pri kio Dro W. Manders ĝentile min atentigis.

Valenteno (K. Kalocsay -G. Waringhien, Plena Gramatiko de Esperanto, 1935,p.144; en sia traduko de Dante: Infero, p. 150 K. Kalocsay tamen uzas: Celestino!)

La elekto inter Aŭgusteno kaj Aŭgustino krome havas aliajn konsekvencojn. Ekzistas ja ordenanoj kaj ordenaninoj, kiuj sekvas la regulon de la sanktulo al pli perfekta vivo. Kiel ni nomos ilin? Ĉu Aŭgustenanoj kaj Aŭgustenaninoj? Aŭ Aŭgustinanoj kaj Aŭgustinaninoj? Ŝajnas la antaŭaj formoj pli belsonaj kaj tial preferindaj.

Certe la regulo de internacieco, al kiu atentigas Prof. Dombrovski, posedas grandan valoron je esperantigo, tamen ne la plej altan valoron! Tiun lastan posedas alia regulo, kiun prave indikas Myron R. Mychajliw en artikolo „Kiam diskutas la Akademianoj” (Amerika Esperantisto, vol. 67, 1953, p. 90):

„Esplorante iun lingvan fenomenon en Esperanto, la bazo de esploro devas esti Esperanto mem: ĝia fundamento, historio de la lingvo, kaj tendenco de evoluo.” (Kvankam la aŭtoro ŝajnas doni tro absolutan valoron al tiu ĉi regulo. Esperanto ja estas ne nur „arbitre arte kreita lingvo”, sed krome sintezo de eŭropaj lingvoj.)

Laŭ tiu ĉi principo: la ebleco por derivi virinajn nomojn, la reguleco de Aŭgusteno kiel vira nomo, la belsoneco de Aŭgusteno, Aŭgustenano, Aŭgustenanino, ĝuste postulas preferon por la lastaj formoj.

Do ne pro malrespekto al Aŭgustino sed ĉar necesas elekto, ni tiel decidis!

Fine ni donas grupon de tiaj nomoj latine kaj esperante:

Antoninus	Antoneno	Faustinus	Faŭsteno	Paulinus	Paŭleno
Augustinus	Aŭgusteno	Hyginus	Higeno	Rufinus	Rufeno
Bernardinus	Bernardeno	Justinus	Justeno	Saturninus	Saturneno
Coelestinus	Celesteno	Marcellinus	Marceleno	Valentinus	Valenteno
Cyrinus	Cireno	Martinus	Marteno	Zephyrinus	Zefireno

Nur Linus staras sola, ĉar pli simpla fermo sen -in tie mankas, kaj tial povas esti: Lino.

Same la tri Lingva Komitatoj: K. Bein, G. Moch kaj J. Schröder proponis en sia listo de propraj nomoj, kiu aperis en Oficiala Gazeto, II, 1909-1910, pp. 202-228:

Aŭgusteno (218)      Celesteno (219)      Justeno (222)  
Marteno (224)      Valenteno (228).

Krome ni povas atentigi pri la uzo de la formo Aŭgusteno en la katolika literaturo, precipe en la belega Aŭgustena Numero de E.K. 1930 n. 83, okaze de la 1500-jara datreveno de lia morto. Inter aliaj artikoloj tie troviĝas la traduko de pastro Jos Lintl de la encikliko „Ad salutem” de Lia Papa Moŝto Pio XI-a.

La saman formon ni trovas en V.V.V.I,43; kaj en V.V.V.II, 115, 130 ktp. dum la nomo: Aŭgustenanoj Reformitaj jam troviĝas en: E.K. 1924-26, 364. Tiel ankaŭ: Konstanteno (V.V.V.II, 167) kaj Celesteno (E.K. 1947, 70).

(Daŭrigota)

H. G. Wannemakers S. J.

## LA MALSANO DE AMATA PATRO.



Dum monatoj la katolika mondo vivis en granda zorgo pro sia Patro: Papo Pio XIIa. Ĉiutage la gazetoj de la tuta mondo alportis tre maltrankviligajn komunikojn. La simpatio ne nur de la katolikoj, sed de miloj da nekatolikoj iris al la nobla Suferanto kaj oni ne ĉesis preĝi por lia resaniĝo. Oni miris pri la animforto kaj la energio de la Maljunulo, kiu malgraŭ protestoj de siaj kuracistoj, ĉiam denove okupis sin pri la aferoj de la Eklezio, pri la bonfarto de siaj infanoj. La 14an de Februaro okaze de la „Tago de la Malsanuloj”, la Papo pere de la radio alparolis la malsanulojn de la tuta mondo, por konsoli kaj kuraĝigi ĉiujn, kiuj suferas kiel li mem.

Venis la 19a de Marto, festo de S. Josefo, en kiu tago 50.000 soldatoj, la „Alpini”, venis al Romo. La sankta Patro sciis pri tio kaj volis fari al ili grandan plezuron: per streĉo de ĉiuj siaj fortoj li kondukigis sin al fenestro, pene grimpis sur ŝtupareton kaj malrapide vidiĝis antaŭ la okuloj de la dekmiloj sur la granda placo: eta blanka figuro en la kadro de grandega, alta fenestro.

Intertempe la entuziastaj ekkrioj: „Vivu la Papo!” formortis; la S. Patro montras per siaj manoj al la ĉielo kiel por diri ke la laŭdo devas koncerni Dion. La homamaso restas silenta, oni estas tro kortuŝita por fari bruon. Kaj malrapide la

Papo benas siajn infanojn; la dekstra mano kun du streĉitaj fingroj signas krucon: maldekstren, dekstren, rektantaŭen! Eĉ sur la vangoj de fortaj soldatoj ruliĝas larmoj: la scio ke la mortemalsana Patro forlasis sian liton por prepari tiun ĝojigan surprizon al siaj infanoj, faris grandan impreson!

Kaj la Sankta Patro mem? La granda fizika fortostreĉo havis mirindan efikon: ek de tiu momento lia sanstato pliboniĝis. Kaj nun jam estas kvazaŭ certe ke li je la 29a de Majo prononcas la kanonikigon de sia sankta Antaŭulo: Papo Pio Xa. Ni danku Dion kaj preĝu ke la resaniĝo estu kompleta kaj daŭra; ni petu la sanktan Dipatrinon ke ŝi forprenu la plej kruelan animan suferon de la S. Patro, finigante la persekutojn de la kristanoj en tiom da landoj. Por tio ni unuigu niajn preĝojn kun tiuj de Pio XIIa, kiu ne ĉesas preĝi por tiu grava intenco. Kaj ni, katolikaj Esperantistoj, ankaŭ preparu nin al la festo de la 29a de Majo, petante la benon por nia movado de la nova Sanktulo, Pio Xa, nia Patrono, kiu jam dum sia vivo benis nin kaj diris la profetajn vortojn: „Esperanto iras renkonte al granda estonto.”

T.D.

\*

### **SARDINIA KAVALKADO EN KOSTUMO.**

Unu el la plej gravaj folkloraj manifestaĵoj, kiuj ĉiun jaron havas lokon en Sardinio, estas la „Kavalkado en kostumo”. Ĝi tiras sian originon de la jena historia okazaĵo. Ĉirkaŭ la jaro 1000 la ligantaj armeoj en Sardinio kaj Pizo venkis surmare la maracenajn hordojn, kaj la venkintaj trupoj estis akceptataj triumfe je reveno al la insulo. La Kavalkado celas rememorigi tiun triumfon, kaj konsistas el pompa parado de pli ol mil kostumoj reprezentantaj multajn dekojn da komunumoj de Sardinio kaj atentantaj la plej malnovan mediteranean civilizon; ĝin partoprenas izolaj kaj duopaj gerajdantoj kaj grupoj en la karakterizaj ĉaroj kun kvar maŭroj katenitaj simbolantaj la venkitajn barbarojn.

Nunjare la „Kavalkado” en kostumo okazos la 14an de majo matene, kaj la partopreno de la diversaj urboj kaj vilaĝoj estos pli impona ol kutime por plireligi la historian medion. Fakte ĝin partoprenos reprezentantaro de Genovo kaj de Pizo por rememorigi la nedisigeblajn ligilojn de tiuj gloraj maraj respublikoj kun Sardinio. Ĉeestos ankaŭ folkloraj grupoj de l'itala duoninsulo kaj de eksterlando.

Ĉerpante el la plej antikva tradicio de la Sardinia-popolo, estos renovigata la „Ardia”, turniro por rajdantoj, kiu en la pasinteco fermis la festojn okaze de batalvenkoj. La konkuroj pri kanto kaj sardinia balo, je la rava ritmo de akordionoj kaj de lokaj muzikiloj, sekvos la turniron posttagmeze kaj estos la lastaj de la manifestado.

Sassari kaj tuta Sardinio entuziasme pretiĝas por akcepti ĉiujn, kiuj kunvenos al la insulo, logitaj de la kostuma parado. La Provinca Oficejo por Turismo, organizanto de la manifestado, certigas ĉiun helpon al la turistoj, aranĝante por ili komfortan vojaĝon kaj plaĉan restadon. La vojaĝoj povas esti efektivigataj aŭ surmare per tute modernaj motorŝipoj kun litoj en ĉiuj klasoj, aŭ per aviadilo da Milano, Pizo kaj Romo. Dum la restado en Sassari estos organizataj ankaŭ ekskursoj per komfortoj autobusoj, kaj tiuj, kiuj deziras restadi pli longe, estos helpataj en la vizito al la lokoj plej interesaj laŭ la historia, turisma, arkeologia kaj folklora vidpunkto. Por ĉiu informo bonvolu turni Vin al S.E.A. Turisma fako ENTE PROVINCIALE IL TURISMO — SASSARI — Piazza d'Italia nr 26.

SARDINIA ESPERANTO - ASOCIO Casella Postale 58 - Sassari Italujo.



## M I N D S Z E N T Y

Estingiĝis la lumoj sur la malgaja scenejo  
kaj la ĉeestantoj disiras, mute kaj vizaĝaltere  
sin direktante laŭ la kvar ventoj.

Sed la tragedio, — via kaj nia tragedio —,  
Mindszenty,

daŭros preter la kulisoj.

Estas necese ke oni starigu novajn krucojn,  
apud la Kruco.

Estas necese ke ili sciu  
ke ni estas U N U kun Kristo,  
kaj ni kontinuigas „gaudentes” Lian Pasion,  
por ke efektiviĝu la mistero  
de la Vivo, kiu ĝermas en la morto.

Jam ne plu malfruos

la Printempalveno.

La persikarboj ekfloros ĉe la Danubaj bordoj,  
kaj la pilgrimantaj birdoj  
konstruos siajn nestojn en la florantaj migdalarboj.

En la karcera mallumeco,

Vi, paca arestito,

perceptos la printempan vagantan parfumon

kaj en la lunlumaj noktoj

la najtingaloj kantos longe

ĉe la kradoj de via ĉelo.

Kaj tiam Vi estos tute certa ke la tuta Familo  
pensas pri Vi.

(Oratio autem fiebat sine intermissione  
ab Ecclesia ad Deum pro eo).

Kiam la tritiko estos falĉata

en la kampoj de Hungarujo,

la kamparanoj diros: „Li fariĝis Hostio

de nia liberigado”.

Kaj proksimiĝos la vinberrikolto, (kiam la folioj de la arboj  
jam estos ekfalantaj), kaj ĉiu pensos:

„Li estis subpremegita, kiel la vinberoj en la elpremilo.

Kiel estis unuakvalita la vino, kiun Li donis

por la granda Oferado! Haleluja!”

El la portugala lingvo tradukis J. M. da Silva.

Verkis Pastro A. de Oliveira Godinho.

\*

## LA MEDICINA HISTORIO DE LOURDES — V

2. Nun, ni vidu la **Malsanulojn** kaj la **Faktojn de Resaniĝoj**.

Kun la jaroj, la praktiko permesis grade plibonigi la funkciadon de la Oficejo, kiu, oni povas diri, estas preskaŭ perfektaĵo. Dum la vintro la eparĥiaj Organizaĵoj, religiaj kaj medicinaj, kiuj organizas la Pilgrimojn al Lourdes, kolektas la petojn

de la malsanuloj, dezirantaj veni al Lourdes dum la periodo de la Pilgrimoj, ek de Aprilo ĝis Oktobro. Tiuj malsanuloj estas personoj kuracataj aŭ hejme, aŭ en hospitaloj aŭ klinikoj. Ili devas esti kunvene ekzamenitaj de sia kuracisto aŭ de la diversaj kuracistoj de la hospitaloj aŭ klinikoj. Kaj, plie, la malsanuloj devas kunporti sian medicinan „dokumentaron”, tio estas: skribitaj medicinaj atestoj kaj aliaj dokumentoj koncernantaj ilin mem. En la vagonaro kiu kondukas ilin al Lourdes, unu aŭ pluraj kuracistoj estas observantaj ilin. Tiuj kuracistoj faras konatecon kun la malsanuloj kaj deĉifras la medicinajn dokumentarojn. Tiamaniere ili povos doni al la Prezidanto kaj al la kuracanta personaro en la hospitaloj en Lourdes, utilajn klarigojn pri la situacio de ĉiuj. Se la vagonarkuracisto opinias ke iu malsanulo devos esti ekzaminata de la Prezidanto aŭ de aliaj kuracistoj ĉeestantaj en la Oficejo, konsiderante ke tiu kazo estas maloftega aŭ tre speciale inda je intereso, li kondukas lin en la Oficejon. Kiam dum la Pilgrimo malsanulo firme asertas ke li estas resaniĝinta, li estas tuj kondukata en la Oficejon.

Li estas demandata pri sia malsano, sia resaniĝo. Oni legas lian dokumentaron, ekzamenas lin, diskutas, kontraŭargumentas. Se la malsanulo vere ŝajnas resaniĝinta, la ĉeestantaj kuracistoj, kiuj konsentas, subskribas la protokolon de la ekzameno, enskribitan en la registreto. Tiu kajero estas kunigata al la dokumentaro kaj la tuto estas konservata de la Prezidanto. Dum l'aŭtuno kaj la vintro la Prezidanto faras enketon ĉe la kuracistoj kiuj pritraktis la malsanulon antaŭ la resaniĝo. Ĉiuj dokumentoj estas zorge ekzamenataj, kontrolataj. Se la resaniĝo sin tenas post unu jaro, la eks-malsanulo estas kunvokata al la Oficejo por dua ekzameno. Se la resaniĝo estas rekonita de la kuracistoj ĉeestantaj, la kompleta dokumentaro estas konfidata al la Episkopo de Lourdes, kiu ĝin sendas al la **Medicina Nacia Komisiitaro** en Parizo, kunmetita de kelke da eminentaj francaj kuracistoj kaj profesoroj, elektitaj de l'Episkopo de Lourdes. Se la resaniĝo ŝajnas tute neklarigebla laŭ la biologiaj leĝoj, laŭ la sciencaj resanigmodoj, la dokumentaro estas resendata al l'Episkopo de Lourdes. Tiuokaze Monsinjoro transdonas la dokumentaron al la Episkopo de la diocezo kie loĝas la eks-malsanulo. Kaj tiu Episkopo elektas **Laŭkanonan Komision**, kiu, sola, povos proklami ĉu la preparolata resaniĝo estas „mirakla”, jes aŭ ne.

La kuracistoj de la Konstatoficejo kaj tiuj de la Nacia Komisio estas tre severaj. La Laŭkanona Komisio estas ankoraŭ pli severa. Iaj resaniĝoj rekonitaj de la Kuracistoj kiel superpasantaj la naturajn leĝojn, ne estis akceptitaj de la Laŭkanona Komisio, kiu pravige apogas sur la **Leĝoj de Papo Benedikto XIVa** (kiu regis 1740-1758) por decidi sian opinion, por deklari sian opinion. Tiu Papo fiksas la necesajn kaj devigajn kondiĉojn por ke „resaniĝo” estu nomata „mirakla”. Tiuj kondiĉoj estas:

- 1o ke la malsano estu grava, serioza, kaj ne aŭ almenaŭ malfacile kuracebla;
- 2o ke la resaniĝinta malsano ne estu je ĝia ekfinaĵo tiamaniere ke ĝi baldaŭ devus finiĝi;
- 3o ke oni ne estu uzinta ian kuracilon aŭ ke la antaŭa kuracilo estu estinta senefika;
- 4o ke la resaniĝo estu subita, momenta;
- 5o ke la resaniĝo estu kiel eble plej perfekta;
- 6o ke antaŭ la resaniĝo, nek ia amasa elĵeto estu rimarkita, nek ia krizo estu subite veninta, sekve de natura kaŭzo kaj natura horo; ĉar tiuokaze la resaniĝo ne estus mirakla, sed natura. tute aŭ parte;
- 7o ke, fine, post la resaniĝo, nenia remalsaniĝo estu denove veninta.

(Daŭrigota) D-ro Paul Léger.

## RIMARKINDA KONVERTIĜO.

Dum la hispana intercivitana milito unu el la plej fanatikaj malamikoj kaj persekutantoj de la Eklezio estis la prezidanto de la Respubliko, Manuel Azana y Diez. Dum lia regado estis murdataj 13 episkopoj, 4266 sekularaj sacerdotoj (inter kiuj la tiama redaktoro de „Espero Katolika“, sac. J. Font Giralt), 2489 religiuloj, 283 monaĥinoj, 349 porsacerdotaj studentoj. Iam Azana triumfante ekkriis en la hispana parlamento: „Hispanio ĉesis esti katolika lando!” Post la fiasko de la komunista respubliko li fuĝis al Francujo.

Tamen, en la lastaj tagoj de sia vivo tiu terura persekutinto pentante revenis en la sinon de la Eklezio. Li kuŝis grave malsana en hotelo de Pau, kiam li la 17an de Okt. 1940 venigis la episkopon de Lourdes kaj Tarbes, mons-ron Théas, kaj esprimis al tiu la deziron, morti kiel filo de la Eklezio. La episkopo montris al la malsanulo sian krucifikson, kiun Arana prenis en la manojn, kizante la vundojn de la Savinto, ripetante: „Jesuo, estu al mi kompatema; Jesuo, estu al mi indulgema!” Li konfesis siajn pekojn al la Episkopo, kiu promesis poste reveni kun la S. Komunio. Tamen ĝis kvinfoje oni baris la vojon al Mons-ro Théas sub preteksto ke tio tro ekscitus la mortonton, ĝis fine lia edzino meznokte venigis la episkopon, kiu administris al la eks-prezidanto la lastan Sanktoleadon dum plena konscio.

Eble la preĝoj de la martiroj, liaj viktimoj, akiris tiun gracon al la persekutinto; la indulgemo de Dio estas senlima! Tial ankaŭ ni ne nur preĝu por la nuntempaj persekutatoj, sed ankaŭ por la persekutantoj, por ke ili konvertiĝu!

\*

## ESPERANTO VIVAS.

Krom la internaciaj kongresoj de UEA kaj IKUE okazas en 1954 multegaj aliaj kongresoj, ferioj ktp, regionaj, naciaj kaj internaciaj, kiujn ni neeble povas eĉ mencii. Ni donas ĉi-sube liston de la ĉefaj internaciaj Esp. kunvenoj pri kiuj ni scias, ne menciante detalojn, sed nur la datojn, lokojn, kaj la adresojn kie oni povas informiĝi.

3-8 Majo, **Verona**, Italujo; **Intern. Federacio de Esperantistaj Fervojoj**: S-ro C. Bassani, Via S. Leonardo 14, Verona.

1 Apr.-30 Sept. **Bauge**, Francujo (Maine & Loire); **Kultura Esp. Domo „Gré-sillon”**, intern. libertempejo, kursejo ktp.

5-7 Junio, **Liège**, Belgujo; **Beneluksa Esp. Kongreso**: F-ino J. Terrijn, Raapstr. 74 Gent, Belgujo.

17-24 Julio, **Helsingör**, Danujo; **Intern. FERIAJ Kursoj de U.E.A.** s-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhöj, Danujo.

24-30 Julio, **Newbattle Abby Kolegio** n/Edinburgh, Skotlando; **Intern. FERIA Semajno**: Esp.-Soc. 20 Glendevon Rd. Edinburgh 12.

24-30 Julio, **Konstanz**, Germanujo; **Intern. FERIA Semajno**: S-ro M. Schmidt, Grüngang 8, Konstanz.

24-31 Julio, **Hilversum**, Nederl.; **Intern. Junularkunveno TEJO**: Lobeliastr. 4, Hilversum,

24-31 Julio, **Oosterbeek**, Nederl. **Konferenco de Kristana Esperantista Ligo Internacia**: s-ro A. Storm, Goudsbloemstr. 13c, Vlaardingen, Nederl.

28-30 Julio, **Antwerpen**, Belgujo; **Internacia aŭtokongreso**: s-ro H. Sielens, Houwerstr. 12, Antwerpen.

7-11 Aŭg., **Leeuwarden**, Nederl. Intern. postkongreso: f-ino A. Laverman, Molenpad 69, Leeuwarden.

7-11 Aŭg., **Rotterdam**, Nederl. Esperanto postkongreso: s-ro J. Driesen, Sam. Mullerstr. 7a, Rotterdam-West.

8-15 Aŭg., **Frostavallen**, Svedujo: **Sveda Somera Semajno**: s-ro J. Strönne, Amiralsg. 36, Malmö, Svedujo.

11-18 Aŭg., **Lofthus**, Norvegujo: **Esp. Ferio Intern.**: s-ro K. Sivertsen, Blekenberg 52, Bergen, Norvegujo,

17-24 Okt., **Vejle**, Danujo; **Aŭtunaj Feriaj Kursoj**: s-ro L. Friis, Ingemannsvej 6, Aabyhoj, Danujo.

★

## RECENZO.

**D.ro Paul Neergaard: ATAKOJ KONTRAŬ ĜARDENPLANTOJ** kaj kiel prilukti ilin. 23 x 15<sup>1</sup>/<sub>2</sub> cm., ruĝe tolbind. 234 p. kun 75 fotoreproduktaĵoj kaj 9 kolortabuloj. Eld. The Esperanto Publishing Co. Ltd. Rickmansworth (Anglujo). Prezo inkl. afranko f 11,—

La eldono de ĉi tiu libro estas grava entrepreno. La tuto estas praktika scienca verko. La libro priskribas tre bone multajn malsanojn kaj difektojn en plantoj, ĉu de patologia ĉu de insekta origino. Certe la verkanto sukcesis en la du celoj, kiujn li mencias en la antaŭparolo: parte prezenti enkondukon en la sciencon, kiun la libro pritraktas, parte kulturi novan kampon faklingvan en Esperanto. La libro estas tre freŝdata, kaj en la sciencaj esploroj de fungoj, bakterioj, kaj virusoj, kaj en la kemikaj kontraŭrimedoj por prilukti la malsanojn.

Grava tamen estas la temo enkonduki en Esperanto vulgarnomojn el la naciaj lingvoj. Certe tio estas almenaŭ nuntempe utila. Tamen pri la maniero de la verkanto mi ne povas entusiasmigi. Ekz. melduo, laŭsoj, ĝardencimo, longkrurulaĵoj kaj ankoraŭ multaj aliaj devenas nur de la ĝermanaj lingvoj, kaj eĉ tie ili estas komunaj. Nenie mi renkontis vulgarnomojn el latindevenaj lingvoj (franca, hispana, itala). En la ĝermanaj lingvoj la radiko „meldu-“ ekestis laŭ okulimprezoj, same kiel en la franca lingvo (le blanc). La Esperanto-formo „meldu-“ tamen nun ekestas laŭ sona kongruo kun kelkaj naciaj lingvoj. Kaj kial „bordozlikvaĵo“ anstataŭ „likvaĵo de Bordeaux“? Kial klabradikozo, kiun mi nur supoze rekonis, ĝis sur p. 167 mi sciiĝis ke ĝi estas „Plasmodiophora brassicae“, kiu vulgarnome en franca kaj germana lingvo estas „hernie“?

Mi opinias ke ĉi tiu temo ankoraŭ devas esti pristudata de diversaj fakuloj, La libro estas sur tre bona papero kaj preskaŭ sen preseraroj, kio certe estas des pli laŭdinda pro la malfacileco de la enhavo.

Nur mi miris pri la ofta uzado de „damaĝo“ anstataŭ de la jam longe ekzistanta „domaĝo“. Tio tamen ne estas erariga.

Mi povas tutkore rekomendi la libron al ĉiu, kiu havas intereson por la hortikulturo.

L. G. C. DE JONG

Direktoro de Hortikultura Lernejo.

★

**Deziras korespondi** per leteroj kaj il. p. k. F-ino Irma Reed, 28 Paken St, Morningside, **Brisbane**, Queensland, Aŭstralio.